# Eterna gloro de l' ĉiel'

## ÆTERNA CÆLI GLORIA




3. Leviĝis jam la taga stel',
   heroldo de l' fidela bril'.
   Tenebro nokta cedis for,
   kaj sankta lum' heligas nin.

4. El nia kor' forpelu ĝi
   la nokton de ĉi tiu mond',
   ke ĝis la fin' de nia temp'
   ni vivu virte antaŭ Vi.

5. En ni radiku kred' kaj fid',
   ĝojigu, due, nin esper',
   finfine am' kaj karitat' –
   plej granda ĝi el tiuj tri.

6. Al Vi, ho Krist', plej pia Reĝ',
   kaj al la Patro estu glor'
   kaj al la sankta Paraklet',
   tra ĉiu temp' kaj en etern'. Amen.

ÆTERNA CÆLI GLORIA • Brevier-Himno: Ordinara tempo > 1a kaj 3a semajno > vendredo > matena laŭdo • M: Albrecht Kronenberger 2015-12-11 • latina T: 7a / 8a jarcento • E: Peter Langenecker kaj Albrecht Kronenberger 2005